



# PACO

JAPANA  
ELDONO

MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (M.E.M.)



1982

## AZION KAJ JAPANION NUKLEMILITA BATALKAMPO

### — Ne Permesu Reagan Politikon de Reagan —

#### 1. Malobservo de la Tri Kontraŭ-Nukleaj Principoj

En sia deklaro de la lasta novembro, la usona prezidento Reagan rekonfirmis ke ekzistas ebleco de limigita nuklemilito, kaj tuj poste direktoro Rostow de la Agentejo por Kontrolado de Armado kaj Malarmado malkaŝe parolis pri ebla disarango de krozaj misiloj en Japanio. Tiuj ŝokaj deklaroj montras kiel senprudente la administracio de Reagan efektivigas programon de ekspansio, kies kerno estas la danĝera plano de limigita nuklemilito kiu farus ankaŭ Japanion batalkampoj, pretekste de "konfrontado kontraŭ soveta konstruado de novspecaj nukleaj armejoj".

En majo, 1980, estis malkaŝite fare de emerita usona ambasadoro al Japanio E. Reischauer ke nukleaj armiloj jam estas enportitaj en Japanion, kaj ke Japan-Usona Milita Alianco jam fariĝis nuklemilita alianco. La japana popolo estas unuiĝinta en sincera espero kaj fervora deziro pri la Tri Kontraŭ-Nukleaj Principoj, inkluzive de neenportado de nukleaj armiloj en Japanion." La deklaro de Reagan kaj Rostow signifas nepardoneblan provokon al tiu Tri Kontraŭ-Nukleaj Principoj. Plue, tiuj teruraj rimarkoj montras la eblecon ke Japanio denove involviĝas en katastrofon milojn aŭ dek milojn da fojoj pli mizeran ol tiu de Hirosima kaj Nagasaki en 1945. Ĉar la japana esperantistaro reprezentas ununuran atombombitan nacion en la mondo, ĝi indigne kaj severe protestas la agojn de la administracio de Reagan.

#### 2. Limigita Nuklemilito Faros Usonan Ĉeflandon Sanktejo

Sinsekvaj planoj pri la konstruado de nukleaj armiloj estas publikigitaj lastatempe de la administracio de Reagan. La ĉefa trajto de tiuj planoj estas ke Usono rapide pretigas sin lanĉi limigitan militon — limigitan en la senco ke nek unu nek la

alia puŝos butonon de strategiaj nuklearmiloj, kaj la nukleaj eksplodaĵoj ne atingos la usonan ĉeflandon. En la fono de tiu militopreteco estas la decido produkti neŭtronajn bombojn, kaj rimarkinda plimultigo de strategiaj nukleaj armiloj. Tiuj planoj de Reagan estas nenio alia ol desegnaĵoj por nuklea milito kun la popoloj de Azio kaj Eŭropo kiel "Ŝildo kontraŭ nukleaj armiloj" por Usono. Ili ne estas planoj provizi la azian kaj eŭropan popolojn por "kontraŭnukleaj ombreloj". Tiuj planoj devas esti nomata sovaĝa provoko al la homaro, ĉar ili estas antaŭkalkulita strategio por meti nur Usonon en sendanĝera zono, kaj fari ĝin sanktejo, dum eksplodonta nuklea milito en Azio kaj Eŭropo.

#### 3. Pligrandiĝanta Danĝero de Tutmonda Nuklea Milito

Ekzistas serioza danĝero ke se fojon okazos nuklea milito, ĝi ne estos limigita al tiu areo sed tuj disvastiĝos al la tuta mondo en hodiaŭa internacia situacio kun stoko da nukleaj bomboj egalvaloraj al unu miliono da hiroŝimotipaj. Tiuj kiuj preteratentas tion ne havas politikan senton. Plano pri limigita milito devas esti kondamnita kiel terura krima ideologio.

Efektivigante la rimarkojn de Rostow, Reagan publikigis planon ke Usono ŝargos nukleatakajn submarŝipojn per nukleŝargitaj krozaj misiloj. Tiuj estas tute samtipaj misiloj kiuj fariĝis la celobjekto de kritiko de kontraŭstaraj movadoj en Eŭropo.

Rilate al tiu problemo la registaro Suzuki asertis en la parlamento ke ne povas esti ke nukleaj armiloj estas enportitaj en Japanion pro tio, ke ekzistas la klaŭzo pri anticipa konsultado en la Japan-Usona Sekuriga Traktato. Evidentiĝis kiel grave la japana registaro trompadas sian popolon kaj kiel senfruktaj estas la deklaroj de la japana registaro kiu pretervidas la brilegantajn

faktojn ke nukleaj armiloj estas enportataj en Japanion sub la Japan-Usona Sekuriga Traktato.

#### 4. Ni Alvokas ke Ĉiu Persono Diru "Ne" al Nuklea Milito

Ni sincere kaj fervore alvokas al la mondo ke ĉiu persono kontraŭstaru la komploton ŝanĝi sian landon en batalkampoj de nuklea milito, kaj forte

protestas en ĉiu ebla maniero kontraŭ la plano de la administracio de Reagan por limigita nuklea milito. Ni japanaj esperantistoj kontraŭstaras la proponitan disaranĝadon kaj konstruadon de nukleaj misiloj "theater" en Japanio kaj aliajn danĝerajn planojn efektiviĝotajn ĉirkaŭ ni, kaj plifirmigas solidarecon kun okcidenteŭropaj k. a. popoloj en la batalo kontraŭ la minaco de nuklea milito, por kompleta malpermeso de nukleaj armiloj.

## REMEMORI HIROŜIMON ESTAS ABOMENI NUKLEAN MILITON

### — Papo parolis en Hiroŝimo —



Jen estas la teksto de la pac-alvoko adresita al la mondo fare de Papo Johano Paŭlo II en Hiroŝimo la 25an, feb. 1981.

Milito estas la ago de homo. Milito estas pe-reigo de homa vivo. Milito estas morto.

Nenie tiuj vortoj pli forte trudas sin al ni ol en tiu ĉi urbo Hiroŝimo, ĉe tiu ĉi monumento de paco. Du urboj por ĉiam havos siajn nomojn unu apud alia — du japanaj urboj Hiroŝimo kaj Nagasako, kiel solaj urboj en la mondo kiuj havis malbonan sorton esti rememorigilo pri la homa kapablo por nekredebla detruado. Iliaj homoj por ĉiam elstaros kiel la nomoj de solaj urboj en nia tempo kiuj estis elektitaj kiel averto al estontaj generacioj ke milito povas detruiri homajn klopodojn konstrui mondon de paco.

S-ro urbestro.

Karaj amikoj ĉi tie ĉeestantaj, kaj ĉiuj el vi kiuj aŭskultas mian voĉon, kaj kiujn mia mesaĝo atingos.

Estas kun profunda emocio ke mi venis ĉi tien kiel *pilgrimo de paco*. Mi deziras ke tiu ĉi vizito al la Hiroŝima Pac-Monumento estu el profunda persona konvinko ke rememori la pasintecon estas ligi sin respondece al la estonteco.

Lige kun tio ni rememoras ke estas unu el malĝojigaj faroj de la homaro ke sur la tuta surfaco de la tero nomoj de tre multe — tro multe — da lokoj fariĝis memoraroj ĉefe pro tio, ke ili vidis la hororon kaj suferon kaŭzitan de milito; militaj monumentoj, kiuj krom la venkon de unu flanko rememorigas ankaŭ suferon kaj morton de sennombraj homoj; tombejoj kie ripozas tiuj, kiuj viktimitis siajn proprajn vivojn en la servo al sia lando aŭ al nobla kaŭzo, kaj tombejoj kie kuŝas senkulpaj civitanoj viktimitaj de detruiva furiozo de milito; la restaĵoj de koncentrejoj kaj ekstermejoj, kie malestimo por homo kaj liaj netuŝeblaj rajtoj

atingis sian plej malnoblan kaj kruelan esprimon; batalkampoj, kie naturo jam kompateme resanigis la terajn cikatrojn, sed sen povo nuligi estintan homan historion de malamo kaj malamikeco. Hiroŝimo kaj Nagasako elstaras el ĉiuj tiuj aliaj lokoj kaj monumentaĵoj, kiel la unuaj viktimoj de nuklea milito.

Miklinas mian kapon kiam mi rememoras milojn da viroj, virinoj kaj infanoj kiuj perdis siajn vivojn en tiu terura momento, aŭ kiuj dum longaj jaroj portadis en siaj korpoj kaj mensoj semojn de morto, kiu senkompate daŭrigas sian procezon de detruado. La fina bilanco de homa sufero kiu komenciĝis ĉi tie ankoraŭ ne estis plene dokumentita, nek la totala homa kosto estis finkalkulita, precipe kiam oni vidas kion faris nuklea milito — kaj povas ankoraŭ fari — al niaj ideoj, niaj sintenoj kaj nia civilizacio.

Rememori la pasintecon estas ligi sin respondece al la estonteco. Mi ne povas min deteni de honorigo kaj laŭdo pri saĝa decido de la aŭtoritatoj de tiu ĉi urbo ke la monumento kiu rememorigas la unuan nuklean bombadon devas esti monumento por paco. Tiamaniere la urbo Hiroŝimo kaj la tuta japana popolo plenforte esprimis sian esperon por paca mondo kaj sian konvinkon ke homo, kiu militas, povas ankaŭ sukcese efektiviĝi pacon. De tiu ĉi urbo, kaj el la okazintaĵo rememorigas ties nomo, *originas nova mondskala konscienco kontrati milito*, kaj freŝa decido laboradi por paco.

Povas esti ke kelkaj homoj, eĉ el tiuj kiuj vivis en la tempo de la okazintaĵoj kiujn ni rememoras hodiaŭ, emas ne pensi pri la hororo de nuklea milito kaj ties teruraj konsekvencoj. Povas esti ke el tiuj kiuj persone neniam spertis la realon de arma konflikto inter nacioj, kelkaj deziras ignoriguste la eblecon de nuklea milito, aliaj deziras rigardi nuklean povon kiel neeviteblajn rimedojn por teni ekvilibron de teruro. Sed ne troveblas pravigo se oni ne demandas pri la respondeco de ĉiu nacio kaj ĉiu persono pri eventualaj militoj kaj la nuklea minaco.

Rememori pasintecon estas ligi sin respondece al la estonteco. Mi elvokas antaŭ vi la memoron de la 6a de aŭgusto, 1945, por ke ni povas plibone kapti la signifon de *la defio de la nuntempo*. Ekde tiu fatala tago nukleaj provizoj pliiĝis en kvanto kaj en detrua povo. Nukleaj armiloj daŭre estas produktataj, eksperimentataj kaj disaranĝataj. La totalajn konsekvencojn de plenskala milito neniu povos antaŭjuĝi, sed eĉ se nura parteto de la utiligeblaj armiloj estus por efektiva uzo, oni devas demandi ĉu la neevitebla eskalado ne estas imag-ebla, ĉu la detruado mem de la homaro ne estas reala ebleco. Mi deziras nun ripeti kion mi diris al la Ĝenerala Asembleo de UN; "La senlimaj preparadoj por milito demonstrataj de la produktado de ĉiam pli multaj, potencoj kaj altkvalitaj armiloj en diversaj landoj montras ke troviĝas deziro esti preta por milito, kaj *esti preta signifas havi eblecon komenci ĝin*; tio ankaŭ signifas *riski tion ke iam, ie, iel, iu povas ekfunkciigi la teruran mekanismon de ĝenerala detruado (n-ro 10)*.


Rememori pasintecon estas ligi sin respondece al la estonteco. Rememori Hiroŝimon estas abomeni nuklean militon. Rememori Hiroŝimon estas ligi sin respondece al paco. Rememori kion suferis la popolo de tiu ĉi urbo estas renovigi nian kredon je homo, je lia ebleco fari tion, kio estas bona, je lia libero elekti ion, kio estas justa, je lia decido ŝanĝi katastrofon en novan komencon. Fronte al la hom-farita katastrofo kia estas ĉiu milito, oni devas konfirmi kaj rekonfirmi, denove kaj denove, ke *la militado ne estas neevitebla nek neŝanĝebla*. Homaro ne estas destinita al mempe-reigo. Malakordoj de ideologioj, aspiroj kaj bezonoj povas kaj devas esti ordigitaj kaj dissolvitaj per rimedoj aliaj ol milito kaj perforto. Homaro ŝuldas al si mem ordigi diferencojn kaj konfliktojn per pacaj rimedoj.

Tiuj kiuj konservas vivon sur la tero devas instigi registarojn kaj decidofarantojn en la ekonomiaj kaj sociaj kampoj *agi harmonie kun la postuloj pri paco* anstataŭ agi pro mallarĝa memprofito. Paco ĉiam devas esti la celo: paco devas esti serĉata kaj protektata. Ni ne ripetu la pasintecon, pasintecon de perforto kaj detruo. Ni ekmarŝu sur kruta kaj malfacila vojeto al paco, la sola vojeto kiu kondukiga al la vera plenumiĝo de la homa destino, la sola vojeto al estonteco en kiu egaleco, justo kaj solidareco estas realaĵoj kaj ne estas nuraj malproksimaj songoj.

Kaj tial, ĝuste sur tiu ĉi loko, kie antaŭ 35 jaroj estingiĝis en unu fajra momento la vivo de tiom multe da homoj, mi *deziras alvoki al la tuta mondo en la nomo de vivo, de humaneco, de la estonteco*.

Al la ŝtatestroj kaj la estroj de registaroj, al tiuj kiuj havas politikan kaj ekonomian potencon, mi diras: ni garantiu pacon per justo; ni faru solenan decidon, en nuna momento neniam toleri aŭ provi militon kiel rimedon por solvi malsamecon; ni promesu al niaj frataj homoj ke ni laboros ne-lacigeble por senarmigo kaj la nuligo de nukleaj armiloj: ni anstataŭigu perforton kaj malamon per konfido kaj prizorgo.

Al ĉiu viro kaj virino en tiu ĉi lando kaj en la mondo, mi diras: ni prenu sur nin respondecon pri ĉiuj aliaj kaj pri la estonteco senkonsidere de landlimoj kaj sociaj distingo; ni eduku nin kaj eduku aliajn en la manieroj de paco; homaro neni-



am fariĝu la viktimo de batalo inter konkurantaj sistemoj; neniam estu alia milito.

Al ĉieaj junuloj, mi diras: ni kune kreu novan estontecon de frateco kaj solidareco; ni etendu la brakojn al gefratoj kiuj bezonas helpon, ni manĝigu la malsatulojn, ni ŝirmu la senhejmulojn, ni liberigu la piedpremitajn homojn, venigu juston tien kie regas maljusto kaj pacon tien kie parolas nur armiloj. Viaj junaj koroj havas eksterordinaran kapablon por bono kaj amo: servigu ilin al viaj frataj homoj.

Al ĉiuj mi ripetas la vortojn de la Profeto: "Ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon" (Js 2:4).

Al tiuj kiuj kredas je Dio, mi diras: ni estu forta je lia forto kiu senlime superas nian propran; ni unuiĝu je la scio ke li vokas nin al unuiĝo; ni konsciu ke amo kaj divido ne estas foraj idealoj sed la vojo al daŭra paco -- paco de Dio.

Kaj al la Kreinto de naturo kaj nomo, de vero kaj belo mi preĝas:

Aŭskultu mian voĉon, ĉar tio estas la voĉo de la viktimoj de ĉiuj militoj kaj perforto inter personoj kaj nacioj;

Aŭskultu mian voĉon, ĉar tio estas la voĉo de ĉiuj infanoj kiuj suferas kaj suferos kiam homoj kredas je armiloj kaj milito;

Aŭskultu mian voĉon kiam mi petas vin ensemi en la korojn de ĉiuj homoj la saĝon de paco, la forton de justo kaj ĝojon de frateco;

Aŭskultu mian voĉon, ĉar mi parolas por la popolamasoj en ĉiu lando kaj en ĉiu periodo de historio kiuj ne deziras militon kaj pretas paŝi la vojon de paco;

Aŭskultu mian voĉon kaj permesu envidon kaj forton tiel ke ni ĉiam povas respondi al malamo per amo, al maljusto per totala dediĉo al justo, al bezono per la divido de memo, al milito per paco.

Ho Dio, aŭskultu mian voĉon kaj permesu al la mondo *vian eternan pacon*.



NUDPIEDA GEN

## INTERVJUO

kun

# S-ino SYOZI KEIKO

**DEMANDO:** Kiel okazis via unua renkonto kun la komikso "Nudpieda Gen (Hadasi no Gen)"?

**S-ino K. Syozi:** Estis antaŭ kelkaj jaroj kiam mi legis tiun rakonton eldonitan libra formo. Tiu-tempe ĝi estis multe priparolata. Mi mem havas infanojn, kiuj estis tiam preskaŭ samaĝaj kiel Gen, heroo de la rakonto. Estis neeviteble por patrino starigi demandojn, kia sorto trafus siajn infanojn, se okazus milito, kaj ĉu ili sukcese travivus la militon kiel Gen.

"Nudpieda Gen" estas konata kiel priatombomba komikso. Tiu kromnomo, tamen, ne plaĉas al S-ro Nakazawa, la aŭtoro. Fakte atombombo estas tre ŝatata temo en liaj verkoj, sed laŭ lia aserto li intencis illustri kiel homoj estis devigitaj involviĝi en la militon, kaj kiel ili vivis kaj mortis en ĝi.

**D:** Kio instigis vin eklabori por la esperanta versio?

**S:** Iom post mia unua renkonto mi aŭdis ke anglalingva versio de la verko estos eldonota. Tuj al mia kapo venis ideo pri esperanta versio. Tiam mi prilaboradis la foto-albumon Hiroshima-Nagasaki kun multe da kunlaborantoj, kaj mia sperto en tiu laboro igis min decidi ke ni pretigu ankaŭ esperantan version de tiu libro por la esperantistoj en la mondo.

**D:** Ĉu vi mem travivis la militon?

**S:** Mi naskiĝis en 1942, kaj mi estis ankoraŭ trijara, kiam finiĝis la lasta mondmilito. Krome, mi loĝis en kampara regiono, kie estis for de la urbo Hiroŝimo. Mi ne memoras pri milito nek atombombado. Tio signifas ke mi estas 4-5 jarojn pli juna ol Gen.

**D:** Kial vi elektis komikson?

**S:** Komikso ne estas mia kutima legaĵo; mi nur havas esceptajn okazojn spekti tiaspecajn librojn de miaj infanoj. Tamen mi trovas ĝin populara kaj facile atingebla komunikilo. Tio motivis min elekti tiun ĝenron. Mi deziris ke ĝi emociu multe da junaj lernejanoj, kiujn interesi ne povis la fotoalbumo Hiroshima-Nagasaki.

**D:** Kiuj scenoj el la libro impresis vin plej forte?

**S:** Ĉiuj scenoj estis ŝokaj por mi. Precipe la sceno en kiu mortis patro kaj gefratoj de Gen unu post alia antaŭ la okuloj de li kaj lia patrino, kiu lasta fine freneziĝis. Por tiuj kiuj perdis siajn familiaĵojn en la milito ĝi daŭras en ili tiom longe kiom ili vivas. Por ili ne finiĝas postmilito.

**D:** Kiel komenciĝis via laboro?

**S:** Ni komencis tion petante de la aŭtoro permeson

pri la eldono de esperanta versio de la verko. Plurfoje mi skribis vane al li, kaj fine mi parolis kun li telefone. Komence li ne estis tiel volonta kiel mi supozis. Verŝajne malkuraĝigis lin procezo, en kiu oni prilaboris la anglalingvan version. Tio komenciĝis en gaja atmosfero kun multe da kunlaborantoj, kiuj unu post alia forlasis la aferon kun iu aŭ alia preteksto. Kvankam en la fino la grupo "Project Gen" prenis sur sin la tutan respondecon por kompletigi la laboron, tio ne forigis de la aŭtoro malkredon pri la civitana movado ĝenerale.

**D:** Kiom vi ŝuldas al la prilaborantoj de la anglalingva versio?

**S:** Kiamili komencis, la plej granda problemopor ili estis reordigo de la paĝoj (japanaj libroj estas foliumataj inverse de la latinliteraj libroj). Oni devis distondi ĉiujn komiksajn fakojn por remeti en inversa ordo. Formoj kaj grandoj de la fakoj estas diversaj. Kelkfoje oni solvis la problemon, turninte bildon surface dorsen. Vi vidas ke en kelkaj bildoj kimona fronto interkovriĝas neordinare. La grupo "Project Gen", iniciatita de kelkaj volontuloj, bezonis 2 jarojn nur por rearanĝi la ordon de la paĝoj. Ni negocis kun ili kaj estis permesitaj uzi ilian originalon.

43 SEKUNDOJN POSTE, 1800 FUTOJN SUPER HIROSIMA, LA ATOMBOMBO NOMATA "SVELTA KNABO" EKSPLODIS BLANK-ARDE, KVAZAŬ MILIONO DA FULMOLAMPOJ SAMTEMPE EKLUMUS.



**D:** Kiel vi solvis monan problemon?

**S:** Baldaŭ post la konsento de la aŭtoro kolektiĝis kelkaj volontuloj por la unua diskutado. Kaj dum unu vespero ni jam starigis ĝeneralan laborplanon. Nia problemo estis mono. Se ni presos 1500 ekzemplerojn ni bezonas ĉ 1,500,000 enojn inkluzive de honorario por la aŭtoro, tajpado kaj presado. Ni alvokis al esperantistoj landvaste por monoforado, kaj kiel rezulte ni sukcesis prunti 1,100,000 enojn de 36 personoj, kun kondiĉo ke la sumo estos redonota kiam la libro estos vendita. Ni ankoraŭ ne havas sufiĉe da fonduso kaj volas apogi nin sur antaŭpago por la eldonota libro.

**D:** Ĉu vi havis malfacilaĵon en la tradukado?

**S:** La tradukado estis plenumita de S-ro Izumi Yukio. Li luktis kaj ŝvitis kontraŭ onomatopeoj kiuj estas tre riĉaj en japanaj komiksoj, sed vieble li ĝuis sian taskon sufiĉe bone.

**D:** Bonvolu klarigi iom pri Rondo Gen.

**S:** Rondo Gen estas eldona grupo de la esperanta versio, formita el kvin produktantoj kaj ĉ 40 subtenantoj. Ĉiuj produktantoj dividas inter si taskojn; tradukado, tajpado, paĝaranĝado k.a., havas regulajn renkontiĝojn kvarfoje monate. Helpis ilin ankaŭ volontuloj. Dank'al iliaj kunlaboradoj la libro estis eldonitaj en februaro ĉijare.

**D:** Kiajn malfacilaĵojn vi havis en via laboro?

**S:** Estis tre malfacile kaj pene por ni enmeti fra-



Aĥ, kion  
vi volas?  
LASU  
min!!

Kna...  
Knabo...  
portu al mi  
AKVON...

zojn en ĉirkaŭstrekon horizontale mallarĝan (Literoj ne viciĝas horizontale en la japana). Unue ni tajpis vortojn konforme al la formo, malgrandigis ilin kopie laŭ kvar gradoj, provizante nin per kvinspecoj da literaroj laŭ grandeco, tiel ke ni povas elekti pli grandan, ekzemple, por emfazo. Kiam linio estis tro longa je unu litero, ni malpligrandigis interspecojn per tondiloj kaj gluo kun tragedia penado.

**D:** Kiuj laŭ via deziro legu vian libron?

**S:** Unue junuloj sendube, kaj ankaŭ plenaĝuloj. Mi deziras ke ĉiuj konu la hororon de la milito.

**D:** Pri kio vi volas alvoki plej laŭte?

**S:** La vorto "paco" sonas iel abstrakta, sed fakte ĝi estas tre konkreta afero, kiu havas siajn radikojn en ĉiutagaj homaj vivoj. Ĉiuj estas respondecaj pri la gardo de la paco. Ĝi dependas sur la klopodoj de ĉiu individuo. Se okazas milito, tio signifas la mankon de niaj kaj viaj klopodoj. Kiam homoj konscias pri tio, la milito estas evitebla. Ebleco de pac-konservo troveblas en ĉiutagaj vivoj. Mi deziras ke tiu libro donu ŝancon trovi tion.

**D:** Kiel vi planas disvastigi ĝin en la mondo?

**S:** La libro estos eldonita en la komenco de 1982. Unue ni sendos ĝin al esperantistoj aliĝintaj al UEA en centoj da landoj. Ni intencas elekti unu organizon aŭ unu personon el ĉiu lando por ĝin donaci. Kaj poste eksterlandaj esperantistoj povos aĉeti ĝin pere de UEA kaj aliaj organizoj.

NUDPJEDA GEN peros Japana Esperanto-Instituto,  
Waseda-mati 12-3, Sinzyukuku, Tokio, Japanio.  
Postgirkonto: Tokio 3-11325.  
Prezo: 2200 enoj, eksterlanda sendokosto: 450 enoj.

## "PIKA! en Hirosima" en ESPERANTO



Bildlibro nomata "Hirosima no pika" (Pika en Hirosima) estas nun legebla en Esperanto.

La libro estis originale verkita de MARUKI Tosi, artistino kiu mem travivis la tragedion de la atombombado en Hirosima tuj post la historia eksplodo de la atombombo, kun helpo de sia edzo MARUKI Iri, ankaŭ artisto.

"Pika" en la japana lingvo aludas la atombombadon. Per la simplaj kaj fortaj esprimoj de la vortoj kaj pentraĵoj de la aŭtorino ni preskaŭ transsaltas jarojn kaj mejlojn al la okazintaĵo.

La esperantigo estis plenumita de S-ino NARITA Tosiko, dommastrino, kun helpo de aliaj samideanoj. Ŝiaj tradukoj estis presitaj en la formo de broŝureto kiun oni povas sendi kiel suplemento alla originala bildlibro. Bedaŭrinde ŝia esperantista kariero ne estas longa, kaj ŝia lingvo ne estas perfekta. Sed ni alte taksas ŝian laboron pro tio ke ŝia ekzemplo povas esti imitata de preskaŭ ĉiuj esperantistoj kiuj deziras praktiki Esperanton por la paco.

Se vi deziras aĉeti la libron turnu vin al  
S-ino NARITA Yosiko, Kamiikebukuro 3-46-9,  
Tosima-ku, Tokio, 170 Japanio. Tel. 03-940-8211  
Prezo: 1500 japanaj enoj aŭ egalvalonaj.  
Postgirkonto: Tokio 0-11940

"LIMIGITA NUKLEA MILITO - NE!", "FORĈIŬJ NUKLEAJ ARMILOJ EL NIA TERO", kaj aliaj sloganoj estas legeblaj sur flagoj, ŝildoj kaj tukaj afiŝoj. La 23an de majo estis okazigitaj kontraŭnuklearmilaj kunvenoj en naŭ lokoj en Tokio kaj altiris 406,000 homojn. Alvokoj estis adresitaj al U.N. kaj la japana registaro.

## PLIMULTIĜAS JAPANAJ INDUSTRIAJ ROBOTOJ

Ili neniam forestas de laboro, aŭ neniam malfruas por ĝi. Ili ĉiam plimultiĝas kaj laboras tiel akurate kiel horloĝo. Ili neniam turmentiĝas pro bruego. Ili estas japanaj maŝinaj "laboristoj", kies nomo venis el Ĉeĥoslovakio kaj kies prapatroj venis el Usono en 1959. Ĉirkaŭ 46,000 da ili estas nun en Japanio, nome 80 procentoj de la totalo de 58,000 en la mondo.

Ili estas mekanismoj ekipitaj per komputero anstataŭ homa cerbo por direkti sian moveblan parton kiu korespondas al homaj manoj.

Toosiba (aŭ Toshiba) estas unu el la kompanioj plej aktive enkondukantaj industriajn robotojn. Ĉirkaŭ 50 milionoj da enoj estis investitaj por meti la tutan kompanion sub fleksebla fabrik-sistemo en venontaj tri jaroj. Tiu sistemo baziĝas sur komputeroj kombinitaj kun industriaj robotoj kaj komputaj (NC) ilmaŝinoj. Tio aŭtomatigos 35 produktoliniojn, inter ili ankaŭ linioj por duonkondukaĵoj, dommastrumaj elektraj aparatoj kaj pezaj elektraj maŝinoj, kaj reduktos la 2,500 dungitojn tie laborantajn al 500.

Toosiba planas daŭrigi tiun procezon ĝis la 25,000 blukolumuloj de la kompanio reduktiĝos fine al 10,000 proksimume.

La agmaniero de robotoj jam venis al la punkto kie ekzemple la "Puma", multecela roboto lastatempe senvualigita de Pez-Industria Kompanio Kawasaki, kapablas kunmeti partojn eĉ se ili kuŝas iom en neĝusta loko, transporti aĵojn de 10 kilogramoj aŭ malpli, kaj surmeti elektran fadenaron por aŭtomobilaj paneloj. La kompanio havas arkoveldan roboton, disvolvitan komune kun la usona firmao Unimation, kun optik-fibra "vidpovo", tiel bona, kiel tiu de stomaka fotilo, por vidi ĉu pecoj de materialoj estas kunvelditaj.

Oni raportas ke ĉirkaŭ 150 firmaoj nun disvolvas industriajn robotojn en Japanio. Aŭtomobilaj firmaoj enkondukis unuaj industriajn robotojn, ĉar ili havis malfacilecon varbi laboristojn por velda kaj pentra laborfakoj, kiuj postulas pezan homlaboron kaj malfaciligas por ili ekspansii sufiĉe rapide la fabrikadon.

Inflacio altigis personajn elspezojn, sed la fabrika kosto por industriaj robotoj malaltiĝis, ĉar komputerfabrikistoj estis ebligataj produkti pli malaltekesté.

Nun la uzo de robotoj estis jam disvastigita por ampleksi preskaŭ ĉiujn fakojn de industrio, nome, fabrikado de elektraj aparatoj, muldado de sinteza rezino, ŝtalfarado, k.t.p.

Perrobota produktado en 1980 plimultiĝis je 36.7 procentoj super la antaŭa jaro. Plimultiĝo en produktado de altgradaj robotoj kreskigis la tutan valoron al 78,400 milionoj da enoj, plimultiĝante je 84.9 procentoj.

Kio kuŝas malantaŭ la rapida enkonduko de ro-

botoj en Japanio?

Unue estas la rapida progreso de teknologio. Ekde kiam integritaj cirkvitoj (IC), kaj poste grandskalaj integritaj cirkvitoj (LSI), ebligis la produktadon de etformataj, malaltekestaj komputeroj, naskiĝis malaltekestaj kaj altkapablaj industriaj robotoj.

La grava afero estas ke la teknika progreso kaj la enkonduko de industriaj robotoj rezultigis la ekonomiajn kondiĉojn necesajn por grandaj kompanioj fari grandan profiton. Sub tiaj kondiĉoj ili kredis ke la enkonduko de industriaj robotoj kiuj permesis al ili plialtan produktivecon estas pli bonvenigebla ol la dungado de laboristoj, al kiuj ili devas pagi salajron.

Ekde la mezo de 1970aj jaroj, la grandaj kompanioj, malpliigante dungadon por efektiviĝi "pli malpezan mastrumadon" substance plimultiĝis investon por laborŝparado kaj raciigo.

"Robotojn oni komencis rapide enkonduki ĉirkaŭ 1974", diras industria informfonto. "La fabrika procezo en ĉefaj firmaoj, kiel de elektra maŝino kaj fotilo, jam adoptis maŝinojn anstataŭ inajn laboristojn. Plejmulte da virinoj kutimis ekŝiĝi post trijaroj da laborado, kaj okazas nenia problemo aparta kiam kompanioj decidas redukti personojn, se ili simple ne varbas novajn."

La elektromaŝina industrio, kiu enkondukis industriajn robotojn tiel frue kiel la aŭtomobila industrio, efektiviĝis kreskadon de prok. 10 procentoj jare dum la jaroj de petrola ŝoko. En 1973, kiel estis informite, la laboristoj de 1.4 milionoj en la industrio estis reduktitaj prok. je 100,000.

Ĝis nun, la enkonduko de industriaj robotoj ne kaŭzis katastrofan personan reduktion. Tio estas ĉar blukolumaj laboristoj estis "transigitaj" al aliaj oficoj en la kompanioj por kiuj ili laboradis, aŭ "farmigitaj" al siaj filiaj kompanioj.

Insistante ke ekzistas limo en la relokiĝo de laboristoj, laboristaj sindikatoj pritraktis la problemon pri robotoj en la kunveno okazigita ĉi somere. Nova kontraŭraciiga batalo estis proponita ĉi jare en la kunveno de la Ĝenerala Konsilantaro de Laboristaj Sindikatoj de Japanio (Soohyoo), surbaze ke la enkonduko de robotoj signifas plifortigitan laboron kaj plifortigitan labordirektadon. Sindikatoj filiaj kun la Japana Konfederacio de Laboristaro (Doomei), kiu sekvas la liniojn de laboristo-kapitalista kunlaboro publikigis politikon "moviĝi pozitive al partopreno en mastrumado."

La esplorado pri la batoj sur la dungoproblemon estas farata paralele kun viglaj diskutoj pri la robotoj rilate al tio, kie kaj kiel oni devas uzi ĝin.

Robotoj estos uzablaj, ekzemple, por elfosi karbon en la minoj profundaj en japana tero, kiam pli graviĝos la energia krizo kaj pligrandiĝos la postulo pri la karbo, por helpi bani maljunulojn mem ne moveblajn en lito, kaj por labori anstataŭ estingisto.

En Japanio, la "Regno de robotoj", esplorado el la starpunkto de la laboristoj ĵus komenciĝis pro la socia kaj ekonomia batoj de la enkonduko de robotoj. Meze de inversaj cirkonstancoj sub kiuj "homoj plenumas la laborojn kiujn maŝinoj ne povas plenumi", oni havas bezonon pri pli da esplorado kaj alpaŝo.

# INTERNACIAJ KULTUROJ

KIDO Matazi

Ĉu internacia kulturo signifas rektangulajn domojn en ĉiuj mondpartoj? Aŭ ĉu ni devas kontraŭe gardi japanan originalecon per konstruo de kurbtegmentaj kaj templo-similaj oficejoj kaj pajlotegitaj loĝejoj ankoraŭ en la nuna momento? S-ro W. Auld, en lia parolado pri 'Kulturoj kaj Lingvoj: Pontoj kaj Baroj' la ĉeftemo de la 66a U.K., diras: "diverseco de kulturoj estas etendigo de individua diverseco kaj buntigas la vivon (HdE, N-ro 9-10, P. 2)":

## Diverseco kaj apartiĝo

Japana proverbo diras: "Dek personoj, dek malsamaj individuoj." Ŝajnas esti universale aprobite, ke neniu estas identa, korpe kaj anime, kun alia ol si mem. Alivorte, ĉiu estas absolute sola en la tuta mondo koncerne sian identecon. Kiam tiaj malsamaj personoj, inspirite de malsamaj medioj, klopodas ĉiu por kreado per malsama materialo, ilo, tekniko, kaj kun senfine malsama grado de sperto, tiam estus neeviteble, ke rezultas diverseco aŭ originaleco, spontanee kaj senintence; oni ne bezonas celkonscie algluiĝi al malnovaj formoj. Lingvo iusence donas bonan ekzemplon de diverseco. Registaro ofte timas danĝeron en ĝi, sed kompreneble ĝi estas bonvena por popolo, ĉar ĝi buntigas nian mondon, kiel S-ro Auld diras. La tezo de Maŭ Zedong pri literaturo: "Kune floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj" ŝajnas ĝuste pravi. Se la tuta naturo estus kovrita de blankaj aŭ ruĝaj floroj ekskluzive, kiel teda fariĝus la mondo! Kaj se la tutaj urboj en la mondo prezentus nur rektangulajn konstruaĵojn regule aranĝitajn, turismo jam ne allogus nin. Koncerne literaturon, regus monotono kaj stereotipoj tie, kie estus permesite priskribi nur revoluciojn kaj socialismajn konstruojn, aŭ nur heroojn laborantajn en ili.

La diverseco akceliĝas en izoliteco, kaj inverse ankaŭ akcelas izolitecon aŭ apartiĝon. Japanio, insula lando, ĉirkaŭita de maro, tial estas geografie izolita de aliaj landoj, kaj plue enfermita kaj dividita fare de la feŭdale reginta familio dum ĉirkaŭ 400 jaroj. Ĉi-tie floris diversaj kulturoj ekstreme ekzotikaj por fremdaj okuloj, kiel ekzemple 'ikebana' (floraranĝo), 'ĉanoju' (te-servo), 'kabuki' (teatraĵo), 'noo' (teatraĵo kun maskoj), 'haiku' (17-silaba poemeto), 'tanka' (31-silaba poemeto), 'ukijoe' (ĝenro-pentraĵo), arkitekturo, porcelano, lakaĵo, ktp, kiaj estas detale klarigitaj en 'Enciklopedieto Japana' de S-ro T. Nakamura. Multaj el ili estas alte taksitaj mondscale, kaj ekzemple 'ukijoe' laŭonidire donis fortan influon sur francaj pentraĵoj de impresionisma skolo. Kaj kelkaj, ekzemple 'haiku' kaj 'tanka' estis vaste popularigitaj, kaj rezultis amasa naskiĝo de alt-nivelaj popolaj literaturaĵoj. Sed multaj aliaj, enfermiĝinte en si mem, kaj apartiĝinte de la fremdaj, fariĝis tro partikularaj aŭ tro esoteraj.

Post la mondmilito, la usona demokratio inundis nian landon, pro kiu ni dankas tutkore. Sed kune estis enportita giganta komercismo, kiu minacis transformi niajn kulturojn en reklamojn. Ĝi utiligas originalecon, belecon kaj eĉ seksan ĉarmon sole por altiri popolan atenton, kaj tiel vendi ĉiam pli multe. Dank'al nesupereble fortaj reklamoj, eĉ mia maljuna ino diras nun 'open' anstataŭ 'hiraku' koncerne magazenojn, 'one pack' anstataŭ 'hitocucumi', kaj 'bag' anstataŭ 'tesage'. Pli bedaŭrinda estas malkleriga efekto de komercismo, miskomprenigante la nekompreneblajn kiel la superajn. Ĉiutage estas anoncataj strangaj fremdaj vortoj en televida reklamo, aŭ trovataj sur grandformataj luksaj folioj en tagĵurnaloj, precipe okulfrape en kosmetiko: Pola polissima, seracs II powder spray, supplex scalp toning lotion, hair oil de Lure, Benefique nutrient emulsion, since 1885, 50 % off sale, neoparlour corner, casual bag, ktp. Japanio estis lingve koloniigita.

## Universaleco kaj asociiĝo

Ĉiuj devas havi, en si mem, antipode malsamajn impresojn pri homo aŭ homaj kreitaĵoj. Unu koncernas identecon, kaj la alia diversecon. Oni diras unuflanke, ke homoj estas finfine egalaj, ĉar ĉiuj egale mortas, amas siajn idojn, pariĝas kun inoj, kaj aspirino forprenas febron de ĉiuj egale. Aliflanke, la samaj individuoj ankaŭ miriĝas je la diverseco en lingvo, skribmaniero (horizontala kontr. perpendikulara), tekniko (puŝa kontr. tira segado), manĝmaniero (perbastoneta, perforka, perfingra), kaj precipe en kosmetiko (ĉarma por unu tribo, ŝoka por aliaj). Estas do ne tiel malfacile konkludi, ke malgraŭ tiel evidenta diverseco en kulturoj menciitaj en la komenco, troviĝas, en la sino, la universala identeco, kiu ignoras malsamecojn de lando, raso, aĝo, kaj malsamecojn de kulturo laŭ speco, ĝenro kaj stilo, libere transsaltante la barojn de la limo, nur se kulturoj havas forton kortuŝi nin.

Kaj tia raso-spitanta identeco nature kulturigas internacian senton, kontribuante al internacia ligiĝo. Same aĝo-nedependa egaleco servas al intergeneracia asociiĝo, kunigante la maljunan al la juna. Tiamaniere, la universaleco de kulturo estas la bazo de internacia kaj intergeneracia kunlaboro, kiu ebligas ununacian kulturon nutri la alian, kaj kiu instigas generon de nova kulturo sur nutraĵo de la tradicia, kiel esperas Ragnasson (esperanto 1981 feb/21-22). En la kazo de literaturo, nacilingva diverseco ankoraŭ prezentas duran obstaklon, kaj ĝin forigi eblas nur Esperanto. Por plena florado de cent floroj, sukceso de Esperanto estas arde dezirata. Tiam kune proksimiĝos la mondpaco.

En la fino, permesu min skizi la politikon de arto inkluzive de literaturo. Laŭ mia opinio, la plej grava kondiĉo por ilia plena florado estas liberigi ilin el ĉia ajn kateno. Multaj ne scias kio estas arto. Sed multaj sentas ĝin tiel akre kaj aktuale kiel ili kompreneble sentas tion kio kortuŝas ilin, ĉar tia ekzaltas iliajn animojn kaj donas al ili forton por kuraĝe vivi kaj labori. Ili ankaŭ aŭdas multajn normojn kaj tabuojn por arto, ekzemple belecon, harmonion, originalecon, realecon, ktp, kiel la unuajn, kaj stereotipon, banalecon, vulgarecon, komercismon, ktp, kiel la duajn. Sed ili ne estas certaj, ĉu ĉiu el ili efektive kontribuas al kreado de arto, ĉar beleco povus aŭ kortuŝi



## En Paco Kresku Niaj Nepoj Karaj

Nadia Andrianova

Nepeto mia, en la mondon ĵus veninta,  
trankvile dormas en ĉareto blua,  
kiel ĉielo pura kaj lazura super ni.  
Ni promenadas apud nova ponto –  
unika en la mond' veldada pont' Patona –  
dum bela suna tag' de l'frua primavero,  
kaj lulas vin nun, ritme plaŭdante,  
la diamantaj ondoj de la grandrivero Dnipro,  
kaj lulas vin nun, ritme plaŭdante,  
la diamantaj ondoj de la grandrivero Dnipro,  
kiuj rebrilas tiel bele sub ventet' aprila...

Kaj rememoris al mi malnovan ponton:  
dum la junec' senzorga, senrezerva  
mi promenadis tie ĉi ne unufoje,  
felica, vivoplena kaj amata.

Ho, kiel foraj estas tiuj jaroj, –  
studentaj jaroj antaŭmilitaj...

Kaj tuj aperis en memor' aliaj bildoj:  
bataloj sangaj kaj kruelaj en ĉi lok',  
kiam Dnipro-Slavutiĉ, glora en jarcentoj,  
tutruĝa iĝis de la sang' de l'defendantoj,  
kaj en ĉielo, nun sennuba, furiozis  
aviadiloj malamikaj kun svastiko,  
kaj falis, falis sur la ponton bomboj...

Kaj terurtremis mi de vivigitaj bildoj,  
sensone vokis en animo mia:

neniam sangu niaj tero kaj riveroj,  
neniam ripetigu tiaj teruraĵoj  
por novaj, junaj homgeneracioj...

Ĝi tedi, stereotipo povus aŭ kateni aŭ ekzalti, kaj originaleco, kvankam multe ŝatata, povus ofte dekadenci en nurajn kuriozaĵojn. Kreado estas naskado, kiu plejparte apartenas al nekonata estonteco. Sed estas plene certe, ke la plej grandan respondecon pri la naskoto havas tiu kiu akuŝas ĝin, ĉar ŝi sola koncipis ĝin, longe kovis ĝin, kaj laste penas tutkorpe kaj tutanime en akuŝado. Tio kion povas fari akuŝistino kaj apudstrantoj estas liberigi tiun kiu akuŝas de ĉiuj zorgoj krom akuŝado. La libereco estas la plej grava kondiĉo por arto. Estus vere domaĝe kaj seniluziige, ke post la kare akirita revolucio, kiu celis liberigi popolon el malriĉeco, ekspluato kaj subpremo, nun estas denove aŭdate pri limigo de libera kreado.



## Ridet' Unua De L'Etulo

Nadia Andrianova

Hodiaŭ unuafoje la nepeto  
rekonis min kaj tutkonscie ekrigardis,  
la okuletoj bluaj ekflametis ĝoje, –  
li havos baldaŭ ja tri monatojn jam!

Reagas li al la ludiloj, sonoj,  
ridetas ĝojas, ekvidinte panjon,  
en mondon rigardante, mirigite, –  
en lian mondon, dume limigitan  
per tiu ĉambro, korto kaj rivero.

Sed li ne scias pri la vasta mondo,  
ŝtormega, malkvieta, mortminaca.

En ĝi la fortoj nigraj, malprudentaj  
ne nur flameton lian feblan estingigi –  
scipovus pereigi la planedon, –  
enorman verdan nian homlulilon,  
ĉar vere vivas ni sur la barelo pulva,  
sur vulkenego preta erupcii,  
ripeti ree Hiroŝima, Nagasaki,  
eĉ multe pli honoran kaj mortigan...

Sed plenkreskuloj bonvolemaj kaj prudentaj  
en la tuta mondo ja ne vane unuigis,  
apokalipsan katalisnom ne allasos  
kaj savos ili nian Teron de pereco, –

por ke sur ĉiuj kontinentoj kresku beboj,  
por vivo – ne por mort' terura destinitaj...

Do dormu dolĉe en lulilo via,  
nepeto mia, en la mondon ĵus veninta!

Fortoj de l'Bono kaj Progreso nepre venkos!

(Aprilo 1982. Kievo, USSR)

# VIVO EN JAPANIO

## Lernantino

## en Mezgrada Lernejo

Ni ricevis interesajn leterojn kun demandoj starigitaj de 26 lernantoj de mezgrada lernejo en Romo nomata Armando Diaz. Ĉar vivo en Japanio ne estas bone informita eksterlande, ni profitas ĉi tiun okazon por ĝin prilumi. Ni petis kvar lernantinojn de la mezgrada lernejo Dai Go (N-ro 5) de la urbo Numazu. Ili estas preskaŭ samaĝaj kiel demandintoj: Aj Yukari (A), Miyamoto Naomi (M), Sirakawa Hiromi (S), Gotoo Yukiko (G). (Substrekita estas familiaj nomoj) Red.

1) Kiujn sportojn vi praktikas?

— Ni praktikas basketbalon, volebalon, softbalon, dogbalon k.a. (A). Tenison (M). Tenison, volebalon dogbalon glitkuron (S). Tenison, volebalon (G).

2) Kiamaniere vi manĝas? Ĉu per haŝioj aŭ per forkoj?

— Ni manĝas per haŝioj (A) (M) (S) (G). Rim. Japanoj bone konservas tradician manĝmanieron. Sed ili ankaŭ konas okcidentan manieron. En la kuireja ŝranko troviĝas ankaŭ okcidentan manĝilaron krom la tradician. Ili variigas la ilojn laŭ celoj.

3) Ĉu vi manĝas sidante sur seĝo aŭ sur la grundo?

— Mi manĝas sidante sur tatamoj (A). Mi manĝas sidante sur seĝo ĉe tablo (M) (S) (G). Rim. Japanoj ne sidas sur la grundo. Tatamoj estas levigita dua planko pretigita por senpera sidado kaj kuŝado. Lastatempe japana ordinara loĝejo preferas havi ankaŭ ĉambro(j)n kun seĝoj apud ĉambro(j)n kun tatamoj.

4) Ĉu virinoj nur dum difinitaj okazoj uzas la tradiciajn japanajn vestojn?

— Ne dum difinitaj okazoj. Ili vestas sin laŭplaĉe jen per tradicia, jen per okcidenta. Ekzistas ankaŭ multe da japaninoj kiuj tute ne uzas kimonon (A). Ne. Tio dependas de personoj (M). Jes. Ordinare oni estas en okcidenta vestaĵo (S). Ni uzas ambaŭ (G).

5) Kiu modo ekzistas en via lando?

— Modoj estas supozeble preskaŭ samaj kiel ĉe vi, kiam ni estas en okcidenta vesto (A) (M) (S) (G).

6) Kiel vi amuzas vin?

— Ni amuzas nin per babilado kun geamikoj (A) (M). Per sportoj kaj butikumado kun amikinoj (S). Mi ludas tenison kaj legas komikson por min amuzi (G).

7) Kial japanaj kamparanoj surhavas tiom largajn



Piroteknikaĵo estas amata refreŝigilo por japanoj en somera vespero.

ĉaperojn?

— Por ŝirmi sin kontraŭ la forta suno en somero (A). Kial mi scias pri tia afero! (G). Kontraŭ la suno (M). Por eviti rektan sunradion (S).

8) Ĉu vi ankoraŭ konstruas domojn kun la tradiciaj tegmentoj?

— Ne por ordinara loĝejoj (A) (G). Se vi aludas la tegmentojn de malnovaj budismaj temploj, ne (M). Ni konstruas pli modernajn domojn (S).

9) Kiuspeca muziko ekzistas ĉe vi?

— Krom klasikajn kaj modernajn muzikojn aŭdeblajn en ĉiuj landoj en la mondo, ni ŝatas aŭskulti kaj kanti "kayookyoku", karakteriza populara melodio (A). Diversaj, sed mi ŝatas aŭskulti klasikan muzikon (S) (M) (G). Rim. En nia lando ekzistas tre diversspecaj tradiciaj muzikoj, kiuj tamen ne plaĉas al gejunuloj ĝenerale. "Kayookyoku" estas komunaj nomoj de diversspecaj popularaj kantoj kantataj en la lando.

10) Kiu estas via tradicia danco?

— En diversaj loĝkvartaloj oni kutimas ĝui *bon-dancon*. Dekoj da geviroj staras en rondo kaj dancas *bon-dancon* vespere en meza somero (A) (M). En nia urbo Numazu ni dancas *numazu-ondo*, populara danco (G). Troviĝas kelkaj knabinoj kiuj lernas japanan klasikan dancon dancatan en kimono (S).

11) Ĉu vi havas tradiciajn festojn?

— Ni havas diversajn festojn: novjara feston, *bon-feston* k.a. En marto ni havas festo por inaj infanoj, en majo por viraj infanoj. En januaro ni ĝuas *dondon-yaki* bruligante pajlajn dekoraĵojn uzitajn en la novjara festo kaj rostas moĉion en fajro (A). Ni festas "tanabata" (festo de someraj

steloj), "hina-maturi" (festo por inaj infanoj kun tradiciaj pupoj), "tango no sekku" (festo kun grandaj tukaj karpoj), someran feston, kristnaskon k.t.p. (S). En Kioto, japana malnova ĉefurbo, oni festas *gion-maturi* en kiu virinoj aperas en unika tradicia kimono (G).

12) Ĉu ekzistas krom la nacia lingvo ankaŭ tuj dialektoj?

— Laŭ regionoj ni trovas iom da diferencoj en nomoj de objektoj. Sed ĝenerale dirite ni havas unu saman nacian lingvon komunan tra la lando (A) (M) (S) (G).

13) Kiu estas via religio?

— Mi mem estas kristano. Ni estas liberaj elekta nian religion. Troviĝas budhismo, ŝintoismo, kristanismo k.a. (A). Mi estas budhista (S) (M) (G).

14) Ĉu ekzistas ĉe vi movado por virina liberiĝo?

— Jes (A) (M) (S) (G). Rim. Ekde jarcento ni havas diversformajn movadojn por virina liberiĝo. Laŭ la konstitucio ambaŭ seksoj estas egalaj, sed praktike ekzistas granda malegaleco en profesia vivo, hejma vivo k.a.

15) Ĉu virinoj devas reveni hejmen vespere je difinita horo aŭ ĉu ili ĝuas iom da libereco?

— Difinita horo por mezlernejaninoj varias laŭ familio. Ĝenerale tio estas ĉirkaŭ la tempo de sunsubiro; prok. la 6a — 7a horo somere kaj 5a horo vintre. Por eksterordinaraj aferoj ni ĉiufoje petas permeson (A). En nia familio ne estas difinita horo, sed ni ne devas reveni tro malfrue (G) (M). Mi povas esti ekstere ĝis la 10a vespere (S).

16) Ĉu ankaŭ vi vivas en demokratia lando?

— Estas tiel laŭ la skribitaj leĝoj. Praktike ekzistas seksa malegareco k.a. La ŝtato estas trudema (A). Ĝenerale dirite, jes (S) (M) (G).

17) Ĉu vi vizitas vian lernejon ankaŭ sabate?

— Jes. Sabate ni havas lecionojn antaŭtagmeze (A) (S) (M) (G).

18) Kiuj estas la lastaj teknikaj malkovroj utiligitaj en Japanio?

— Elektroniko (A). Persona komputero kaj industria roboto (G) (S). Mi ne scias (M).

19) Kial via lando ne rajtas militi kaj havi armeon kaj armilojn?

— En la Japana Konstitucio (1947) oni deklaras ne havi armeon nek armilojn kiel rimedon solvi internacian konflikton en deziro por la eternapaco. (Malgraŭ tio Japanio fakte havas armeon pretekste nur por memdefendo!) (A) (M) (S) (G).

20) De kiam oni ne plu harakiras en Japanio?

— Ekde cent kelkaj jaroj (A) (M) (G) (S).

21) Krom ŝtataj lernejoj ĉu ekzistas privataj lernejoj?

— Jes. Kaj por studi en privata lernejo oni devas pagi multe pli multe (A) (M) (S) (G).

22) Ĉu oni ankoraŭ permesas militistan sporton? Kiom da homoj praktikas ilin?

— Ordinara civitanoj ne praktikas tion. Mi supozas ke ĝi estas praktikata en la lernejoj por policanoj aŭ militistoj (A) (S) (M) (G).

## Rakonto pri la Vulpoj de Ĉironnup

NIWA Masahisa

*"Rakonto pri la vulpoj de Ĉironnup" estis prenita el mitaj rakontoj de ainoj, japana naci-malplimulto. Ili loĝas en Hokkaido kaj aliaj nordaj insuloj. Ne havante siajn proprajn literojn, tamen, ili parkere konservas ege multe da hereditaj rakontoj, ĉiuj tre ĉarmaj.*

Estis sur la norda maro insuleto nomata Ĉironnup.

En printempo, kiam ekfloras vulp-primoloj, venis ĉi tien avo kaj avino kiel kutime.

Dum la lasta milito vivis tie vulpa familio konsistata el gepatroj kaj gefiloj.

La gepatroj ame nutris kaj trejnigis la etulojn.

Iun tagon la geavoj alvenis al la insuleto kaj trovis la vulpan etulinon, kiu perdis vojon.

Ili prenis la etulinon hejmen kaj ame nutris ŝin.

Iun tagon la etulino akompanis la avinon, kiu havas laboron ĉe la strando.

Subite alproksimiĝis tra densa nebulo patrola ŝipo.

Unu el la soldatoj sur la ŝipo estis preta ekpafi al la etulino. La avino forkuris kun la etulino en la brakoj, petante al la soldato "ne pafu".

En aŭtuno la geavoj foriras al la hejma loko, kie ili pasigas severan vintron.

Ĉe la foriro la avino liberigis la etulinon, kaj ĝi forkuris en la arbaron, el kie aŭdiĝis mallaŭte krio de vulpo.

La familio de vulpo denove vivis kvarope, kaj la etuloj kreskis tagon post tago.

Subite eksonis terura bruo de pafilo kaj la etulo falis teren.

Iun tagon la etulino estis mordkaptita de kaptילו, kiun preparis la soldatoj.

La etulino jelpis pro doloro, kaj gepatraj vulpoj klopodis por liberigi ŝin, sed vane.

Baldaŭ alproksimiĝis soldatoj kaj pafis la gepatrojn.

La patra vulpo viktimitigis sin por savi la familianojn.

La patrino vulpo kun vundita kruro pene serĉadis nutraĵon por la etulino, tamen fine malvigligis kaj en neĝa tago formortis kun la etulino sub sia korpo.

Jaroj pasis.

Post la milito, kiam la geavoj venis al la insuleto, nenie troviĝis la vulpa familio.

Ili trovis vulp-primolojn florantaj grupe en la formo simile al la patrino kaj etulina vulpoj.

# BATALOJ

## PRI LERNEJAJ LERNOLIBROJ

### POR SANA DISVOLVIĜO

### DE GEKNABOJ

Malgraŭ la klaŭzoj kontraŭ cenzuro en la konstitucio de Japanio, la reganta Liberal-Demokrata Partio kaj la registaro uzis viglajn rimedojn por la "kribrado" de lernolibroj kiel efektiva cenzuro. La LDP kaj la registaro ankaŭ penas trudi la uzon de ŝtataj lernolibroj en lernejoj.

Aliflanke, instruistoj, gepatroj kaj multe da aliaj konsciaj homoj kontraŭas la sistemon de "lernolibro-kribrado", kiu sendube estas kontraŭkonstitucia. Ili postulas ke estu plibonigitaj la lernolibroj kaj estu starigita demokratia metodo, per kiu kompilas kaj alprenas lernolibrojn.

Grandaj instruistoj kaj komercistoj, LDP kaj registaraj funkciuloj daŭrigas sian atakon farante senbazan argumentadon ke la lernolibroj nun uzataj estas "dekstre orientataj". Ĵurnalaj kaj publikaj kritikoj koncentriĝas sur la atakoj pri lernolibroj; ili pliakrigas la atakojn ekde la lasta jaro kaj lastatempe eĉ malkaŝe parolas por militarisma ideologio.

Kiel la lernolibroj estas nun ekzamenataj por "kribrado"? Funkciuloj de la Eduka Ministerio prezentas, post ekzameno pri lernolibroj (kun blanka frontopaĝo), diversajn opiniojn, sugestante "modifon" (deviga) kaj "plibonigon" (sugesta) kaj postulas ke la aŭtoroj kaj eldonistoj reverku la lernolibrojn. La ekzamenistoj voĉdonas por trovi lernolibron ekceptebla aŭ ne, kaj se ili havas opinion por "plibonigo", tiu opinio efektive multe pezas.

Kiaspecaj reverkadoj estis ĝis nun postulitaj de la Eduka Ministerio en nome de "modifo" kaj "plibonigo"?

Resumo de la opinioj de la Eduka Ministerio estas trovebla en la "Raporto pri Lernolibroj, 1982" (Lernolibra Komitato, Japana Federacio de Unioj de Eldonaj Laboristoj) kiu ampleksas lernolibrojn uzatajn en 1980-81. La raporto diras parte:

(1) (Japana Historio) Lernolibro traktanta limigojn truditajn al libero de parolo kaj politikaj kaj sociaj movadoj de la ĵurnalo kaj leĝoj de sekureca politiko en la Epoko Meizi diras, "Estis laŭ la bontrovo de la registaraj aŭtoritatoj ĉesigi la vendon de eldonaĵoj, haltigi publikajn paroladojn, kaj disigi kunvenojn kaj organizaĵojn. Troviĝis kazoj, en kiu popolo ne povis ekzerci sian liberon de esprimo." ("Plibonigo" sugestita de la Eduka Ministerio): La esprimo "bontrovo de la registaraj aŭtoritatoj" devas esti rekonsiderita, ĉar tio emas kaŭzi miskomprenon.

(2) (Japana Historio) "La Imperiestra Reskripto pri Edukado proklamita en 1980, emfazante la spiritan povon de la Imperiestro kaj lasante lin regi popolajn penson kaj moralon, repuŝis libera-

lajn pensojn kiuj tiam ekzistis." ("Plibonigo" sugestita de la Eduka Ministerio): Tio ne estas akceptebla, ĉar tio reprezentas unuflankan interpreton de la enhavo de la Reskripto pri Edukado.

(3) (Japana Historio) Pri la Japan-Ĉina Milito, iu lernolibro diras, "En Ĉinio, la Incidento Xian instigis la Naciistan Registaron kaj la Komunistan Partion organizi unuigitan fronton kontraŭ Japanio kaj prenis fortan linion en rezistado kontraŭ japana agreso por regajni ĉinan suverenecon." ("Plibonigo" sugestita de la Eduka Ministerio): La esprimo "japana agreso" devas esti ŝanĝita en "antaŭeniĝo" aŭ "invado". "Agreso" ne estas la ĝusta vorto por esti uzata en japana lernolibro.

(4) (Monda Historio) Terminoj kiel "var-produktado", "imperiismo", "monopola kapitalismo", "reviziita kapitalismo", "ŝtatomonopola kapitalismo", kaj "financa kapitalismo". ("Plibonigo" sugestita de la Eduka Ministerio): Tiuj ĉi estas specialaj terminoj cititaj el marksisma ekonomiko. Ili devas esti esprimitaj en komunaj terminoj.

(5) (Monda Historio) Efektivigo de la San-Franciska Traktato kaj la Japan-Usona Sekuriga Traktato. "Kiel rezulte, eĉ post la gajno de sia sendependeco Japanio permesis plu usonajn armeformojn resti tie kaj prenis sur sin rolon por igi sin resti kontraŭkomunista militbazo en Azio." ("Plibonigo" sugestita de la Eduka Ministerio): Tio ĉi ŝajnas esti tro malkaŝema. Uzu pli moderan esprimon. La esenca afero estas ke Japanio fariĝis membro de la libera tendaro gvidata de Usono.

(6) (Geografio) "Akcidento ĉe la atomenergia produktejo en la insulo Three Miles prilumis la danĝerojn de elektra produktado per nuklea energio... porsekurecaj reekzamenoj estas farataj ĉie en la mondo." ("Plibonigo" sugestita de la Eduka Ministerio): Estas rekomendinde esprimi anstataŭe ke ĝi "instruas multe da lecionoj rilate al porsekureca funkciigo".

Tiu ĉi raporto de 1982 ne ampleksas la fortegajn atakojn kiujn direktis ekzamenistoj al lernolibroj de "Moderna Societo". Unu el la lernolibroj de "Moderna Societo" kiu okazigis argumentadon en 1981 donis ses paĝojn por la priskribo de tri kaŭzoj de milito — "milito kaj manipulado de publika opinio", "naciismo" kaj "ekonomikaj faktoroj en milito". Ekzamenistoj de Eduka ministerio postulis forstrekon de ĉiuj tiuj ses paĝoj. Ne estis permesite ke neniu specimeno portas tiun priskribon.

Tiu ĉi lernolibro en la paragrafo "Milito kaj manipulado de publika opinio" klarigas kiel manovroj estis uzataj kiam la incidento de Liu Tiaokou kondukigis al la "Manĉuria Incidento" kaj kiel la incidento de Tonkin kondukigis al la Vjetnama Milito. Funkciuloj de Eduka Ministerio ordonis la forstrekon, ĉar ili ne volis ke infanoj ekscias historiajn faktojn kaj la veron pri la agresmilito.

La Eduka Ministerio ne donas oficialan aprobon al lernolibroj, se ili ne sukcesas en ideologia kaj teoria ekzamenoj. Ekzamenistoj estas nesciencaj, malrespektante kaj negante la veron. Ili havas "imperian histori-rigardon", rigardo kiu kontraŭas la Konstitucion, ĉar ili argumentas ke Japanio estas sub la regado de neinterrompita linio de imperiestroj. Glorigante la sistemon starigitan sub la Japan-Usona Sekureca Traktato, ili intencas utiligi japanan edukadon sub tiu sistemo por revivigi kaj plifortigi militarismen.

# LERNOLIBROJ REVERKATAJ



## — Historia Fono —

Kiam movoj al cenzuro estas farataj sub la nomo de "kribrado" atence de la Konstitucio, ili ricevas fortan kontraŭatakon de kleruloj, instruistoj kaj popolo. La supre menciita sugestado de la Eduka Ministerio ke la vorto "imperiismo" devas esti forigita fariĝis la temo de 13 horoj kaj 20 minutoj da debato inter profesoro, unu el la aŭtoroj de la lernolibro, kaj lernolibro-ekzamenistoj. La profesoro insistis ke lia sciencista konscienco tute ne permesas lin forigi la vorton "imperiismo" kiu estas scienca termino. La procezo de "kribrado" ankaŭ estas procezo de batalado.

La Eduka Ministerio estas en la pozicio, kiel supre dirite, malakcepti ian ajn lernolibron se ĝi estas negative pribalotita de la ekzamenistoj. Sed la Eduka Ministerio ankaŭ estas sub la premo de batalanta popolo kaj publika opinio.

Ĉi-koncerne okazis incidento lastjare. En julio, 1981, ĵurnaloj raportis ke la Eduka Ministerio donis "sankcion" al lernolibro de "Moderna Socio" por supera duagrada lernejo nur post kiam la nomoj de ĉiuj medi-detruantaj entreprenoj estis forigitaj de la libro. Tio kaŭzis grandan publikan reagon, kaj du monatojn pliposte la Eduka Ministerio devis deklari ke la nomoj de medi-detruaj kompanioj estu reaperigitaj. Tiu ĉi okazintaĵo prilumis la kontraŭleĝan "kribradon" de la Eduka Ministerio.

La "kribrado" de lernolibroj estas grava problemo por instruistoj, gepatroj kaj la popolo. La "Raporto pri Lernolibroj", pritraktata ĉi tie, estas jara raporto, kiun preparas la Japana Federacio de Sindikatoj de Eldonaj Laboristoj (Syuppan Rooren), enketinte aŭtorojn kaj eldonistojn de lernolibroj. La raporto estas prezentata al la Japana Instruista Unio kaj Japana Unio de Altlernejaj Instruistoj, kiam ili okazigas sian Nacian Kunvenon por Esplorado pri Edukado.

La Superega Juĝejo eldiris la 8an de aprilo, 1982, juĝon pri la kazo (dua) de lernolibro de Ienaga saburoo. En 1967, historiisto Ienaga saburoo, tiam profesoro ĉe Tokia Universitato de Edukado, starigis proceson, postulante senvalidigo de la rifuzo de la Eduka Ministerio "sankcii" la lernolibron kiun verkis la profesoro.

La decido kiun eldiris la prezidanta juĝisto Sugimoto pri tiu ĉi proceso ĉe la Distrikta Juĝejo de Tokio estis rimarkinda en tio, ke ĝi agnoskis la popolan rajton pri edukado kiel la fundamentan spiriton esprimitan en la Konstitucio kaj la Fundamenta Leĝo de Edukado. Tiu decido, antaŭ ĉio, rigardis la procedon de "kribrado" kontraŭkonstitucia. La Alta Juĝejo de Tokio, tamen, evitis juĝon pri la konstituciaj kondiĉoj de la kazo, sed subtenis la argumenton de la aŭtoro ke la Eduka Ministerio faris neobjektivan kaj arbitran "kribradon".

Fine la decido de la Superega Juĝejo renversis la decidon de la Alta Juĝejo kaj resendis ĝin.

Kun siaj viglaj demagogiaj atakoj pri tio, kion ili nomas "maldekstre orientitaj" lernolibroj, la registaro kaj Liberal-Demokrata Partio penas efektivi ke unu sama lernolibro estu uzata en vasta areo (unu aŭ pluraj gubernioj, ekzemple) kaj eventuale ŝtataj lernolibroj estu uzataj en ĉiuj lernejoj. Ili nun renkontas fortajn kaj obstinajn kontraŭatakojn de la popolo.

Depost la lasta aŭtuno nacia atento koncentriĝas sur problemo de grandskala registara kontrolo pri lernolibro. Severaj postuloj pri la lernolibroj estas trudataj de la Revizia Komisiono alla verkistoj kaj eldonistoj de lernolibroj. Lastatempa plej ofta paroltemo de konsciaj homoj estas registara kontrolo pri "nuntempa socio", deviga lernobjekto por supera duagrada lernejo (15-18 jara). Spite de multfojaj postuloj de opoziciaj partioj la Eduka Ministerio tute ne publikigas — ni ne povas kompreni kial — faktojn kaj motivojn de sia reviziado.

Por kompreni kio okazas trans la fermita perdo, oni devas kompari linio post linio originalajn tekstojn kun la jam eldonitaj. Tia obstina esplorado estis efektive plenumita de multe da instruistoj por helpi parlamentajn debatojn. La instruistoj havigis al si diversspecajn lernolibrojn de la "nuntempa socio" eldonitajn el 7 eldonistoj — nun 21 specoj da lernolibroj por tiu lernobjekto estas eldonitaj el 16 eldonistoj — por atenta esplorado.

La rezulto forte ŝokis nin. La fervoro kun kiu la kontrolistoj plenumas sian reakcian tason superis nian antaŭjuĝon. Iu lernolibro havis 72 paĝojn aŭ 26% de la tuta libro reverkitaj, kaj ĉiuj reverkoj konformiĝas al la linio de kampanjo de kapitalistoj kaj la Liberal-Demokrata Partio.

Ĝeneralaj trajtoj de la reverkoj estas, unue, anstataŭigo de la nocio de disvolviĝanta socio per la nocio de ebena kaj konstanta socio, kaj due, maloftigo de teoriaj kaj kritikaj priskriboj por malmultigi ŝancojn por la geinfanoj ellerni sciencan pensmanieron pri la sociaj problemoj. Kiam oni mencias la Japanajn Memdefendajn Korpusojn, ili ne forgesas aldoni la vortojn "establitaj laŭ la kondiĉoj de la leĝoj". "Patriotismo" estas traktataj naciisme, "la homa devo" estas akcentitaj kontraste al "la homa rajto".

## LERNOLIBROJ EN LA HISTORIO

Se ni retrorigardas nian historion, ni trovas, ke la du ĉefaj fortoj malantaŭ la militarismo kaj ultranaciismo de antaŭmilita Japanio estis la armeo kaj la sistemo de ĝenerala edukado. Pli ol 90% de la infanoj kiuj kreskis en tiu ĉi periodo ricevis devigan edukadon en elementaj lernejoj kiuj estis sub strikta kontrolo de la registaro. Lernolibroj, fakte solaj materialoj siatempe permesitaj en la klasĉambroj, estis nur ilo de ŝtata politiko.

Estis en 1880, kiam la japana registaro komencis subpremi la burĝonan movadon por libereco kaj popolaj rajtoj. Ĝi unuafoje enlistigis neakceptablajn lernolibrojn, kaj sekvantan jaron formulis

regularon por instruado, kiun lernolibroj devis sekvi. En kiu ekzemple la instruado de monda historio estis malpermesita, kaj nur japana historio povis esti instruata. Laŭ la registara opinio, la sola celo de histori-instruado estis nutri respektemon por la imperiestro.

La sekvanta atako al lernolibroj venis ĝuste antaŭ la Ruso-Japana Milito (1904-1905). En 1890 la registaro publikigis la Imperiestran Reskripton pri Edukado, per kiu ĝi planis alporti al edukado la saman sistemon de penso-kontrolado kiel estis enplantita en la armeo. "Se okazos ŝtata gravaĵo, oferu vin mem kuraĝe al la ŝtato; kaj tiel gardi kaj subteni la prosperon de Mia Imperiestra Trono" — tiu instrukcio restis la gvidprincipo de edukado en Japanio ĝis 1945.

Ekde tiam lernolibroj estis tre ofte reverkitaj por efektiviĝi novajn registarajn politikojn, por fine enkonduki la tutan nacion en tiun tragedian militon.

## POSTMILITA REFORMO KAJ APERO DE LIBERAJ LERNOLIBROJ

Post la akcepto de Deklaracio Potsdam en 1945, la nova japana registaro akcentis ke la celo de edukado estas akceli mondpacon kaj la bonstaton de la homaro. Tio estis parte pro la insistado de la Okupaciaj Armeoj, sed alia faktoro estis postulo pri demokratia reformo fare de indiĝenaj grupoj kiuj silentadis dum la milito, inkluzive de studentoj. La 31an de decembro, 1945, estis malpermesitaj la instruadoj de etiko, japana historio kaj geografio, kaj ĉiuj malnovaj lernolibroj koncernantaj estis revokitaj.

Antaŭe en 1946 la unua nova lernolibro de japana historio estis publikigita. Titolita "Kuni no Ayumi" (La Spuro de Nia Lando), ĝi estis la unua lernolibro de japana historio ekde la eldono de la Regularo de Elementa Lernejo de 1881, kiu komenciĝis per la priskribo de la ŝtona epoko anstataŭ mitologio. Aldone al tio, ĝi enhavas la fruktojn de antaŭmilita esplorado pri japana historio, ĝis tiam ekskludita el lernolibroj de elementa kaj mezgrada lernejoj.

En la sekvanta jaro estis diskretita la Fundamenta Leĝo de Edukado, kies dek artikoloj starigis novan gvidoprincipon por edukado kaj eduka administrado. Precipe grava estis la decido esprimita en ĝia antaŭparolo por efektiviĝi la idealojn de la konstitucio: la suvereneco de la popolo, la fundamentaj rajtoj de la individuo kaj la rezigno de milito.

"Establinte la Konstitucion de Japanio, ni jam montris nian decidon kontribui por la paco de la mondo kaj la bonstato de la homaro per la konstruado de demokratia kaj kultura ŝtato. La efektiviĝo de tiu ĉi idealo dependas fundamente sur la forto de edukado. Ni estimu individuan dignon kaj klopodu kreskigi homojn kiuj amas veron kaj pacon, kaj estu disvastigita larĝe kaj malproksime la edukado, kiu celas alla kreado de la kulturo samtempe universala kaj individua. Ni nun dekretas tiun ĉi leĝon, konforme al la spirito de la Konstitucio de Japanio, kun intenco klarigi la celon de edukado kaj starigi la fundamenton de edukado por nova Japanio."



Represaĵo el "China Daily", anglalingva ĵurnalo ĉina. —Lernolibro-kontrolisto de la Japana Eduka Ministerio forbrosas la polvon de Toozoo (Tojo), militokrimulo de la IIa Mondmilito.

Kun la Fundamenta Leĝo de Edukado kiel sia gvidilo, edukistoj palpe marŝis al nova sistemo de edukado, malakceptante dume uniforman edukadon. Tio estas aparte evidenta en la unua Kurso de Studoj desegnita en marto samjare. Neapartigebla kun tio estis propono ke lernejoj mem decidu bazan edukon politikon. Tiu ĉi nova politiko estis efektiva plej klare en lernolibroj por la nove kreita kurso de "sociaj studoj".

La Leĝo de Lerneja Edukado, pasigite en 1947, restarigis la lernolibro-aproban sistemon. Tio redonis la preparadon kaj eldonadon de lernolibroj al privataj manoj, nuligante post pli ol 40 jaroj la ŝtat-entreprena sistemon. Liberaj lernolibroj estis uzeblaj ekde 1949. Koscianta pri la problemoj ĉirkaŭ lernolibro-elektado, la eduka ministerio publikigis libreto pri tiu temo en aprilo, 1948. Lernejoj aŭtoritatoj, kiel ĝi diras, estis liberaj, post konsultado kun instruistoj, elekti lernolibrojn kiujn ili kredas la plej bonajn por siaj lernejoj. La prospekto por la lernolibro-elmontrado de 1949 eĉ diras plu: Por malsamaj klasoj je la sama jarnivelo, estas permesite uzi malsamajn lernolibrojn. Al instruistoj estis donita la plej granda fleksibleco en sia elekto pri instrumaterialoj.

La ideologia bazo de militarismaj lernolibroj — la Imperiestra Reskripto pri Edukado evidente kontraŭdiras la spiriton de la nova eduka politiko. Do en junio, 1948 la parlamento pasigis rezolucion por senvalidigi la reskripton.

Ŝajnis ke la nova eduka sistemo bazita sur universalaj principoj disvolviĝos glate kun la subteno de la reprezentantoj elektitaj de la popolo. Internaciaj disvolviĝoj tamen, baldaŭ kaŭzis ke politikistoj retroiri disde sia origino.

## KAJ RENVERSA FLUO

Renversa fluo komenciĝis en 1951, kiam, meze de kreskanta streĉiĝo inter Usono kaj Sovetunio, kaj eksplodo de la Korea Milito, traktatoj pri paco

kaj sekureco (Kia paco!!) estis subskribitaj en San-Francisko, kaj tiel finiĝis la okupacio. En oktobro la Konsila Komitato por la Reformo de Registaraj Ordoj eldonis raporton ampleksantan la edukadon entute, titolitan "rekomendoj koncerne al reformoj en la eduka sistemo". Ili rekomendas inter aliaj aferoj ke membroj de lokaj edukaj burooj estu asignitaj fare de lokaj kaj guberniaj registaroj anstataŭ elektitaj de la popolo kiel ĝis tiam, kaj ke la ministerio de edukado denove prenu sur sin respondecon por la preparado kaj eldonado de lernolibroj. La Japana Instruista Sindikato kaj eldonistoj de lernolibroj kontraŭis tre forte al la fina propono, surbaze ke tio estas revivigo de la antaŭmilita sistemo.

En 1955 la reganta Liberal-Demokrata Partio daŭrigis la ofensivon. En libreto titolita "plendindaj lernolibroj", ĝi krude kritikis la enhavon de lernolibroj de sociaj studoj. Tio estis la unua fojo ke la reganta Liberal-Demokrata Partio turnis sin al tiaj taktikoj kaj la publiko estis ŝokita, kompreneble. La libreto kritikis jenajn kvar tipojn da lernolibroj: 1) tiuj kiuj subtenas instruistajn sindikatojn kaj advokatas ĝian ekzercon de politika potenco, 2) tiuj kiuj ilustras la vivon de laboristoj mizera kaj subtenas radikalajn laboristajn movadojn, 3) tiuj kiuj laŭdas socialismajn sistemojn de Sovetunio kaj Ĉinio dum kritikis la japanan sistemon kaj 4) tiuj plenaj je komunista ideologio. Denove la Japana Instruista Sindikato vigle kontraŭis tion kion ĝi rigardis dekstrula atenco al libera edukado, kaj al ĝi aliĝis diversaj edukaj kaj historiaj societoj kaj la Scienca Konsilantaro de Japanio. Ili tamen perdis la batalon, ĉar pro la kunfandiĝo de Liberala kaj Demokrata partioj antaŭnelonga, la konservativa potenco firme enmanigis la regpovon kaj povis plifirmigi sian regadon super la eduka sistemo.

Registaraj provoj regi lernolibrojn fakte estas nur parto de bone orkestrita kaj sistemigita plano konduki la nacion dekstren. Restarigante sian regadon super lernolibroj, la registaro penas revivigi la antaŭmilitan nacian himnon, "Kimi ga yo" (La imperiestra domino), kaj la Standardon de Leviĝanta Suno.

Sed plej maltrankviligaj estas la registaraj provoj ekde la 1970aj jaroj revivigi la Imperiestran Reskripton pri Edukado. En 1974 la ĉefministro Tanaka kakuei skribis: "Edukado hodiaŭ tro emfazas intelektan disvolviĝon je la kosto de morala disvolviĝo. Dum ni dikigas infanajn intelektajn, malsategas iliaj moralaj." Kaj koncerne la Imperiestran Reskripton li diris: "Ĝenerale ĝi esprimas universalajn moralajn principojn. Ĝi havas kvalitojn, kiuj transiras ties formon, kaj parolas al ni kiel tiam." Lia opinio la formo ne gravas, ĉar ĝi enhavas "universalajn moralajn principojn." Hodiaŭ lia opinio estas dividita de multe da registaraj gvidantoj.

La problemo metita antaŭ ni estas kiel eviti registarajn subpremajn politikojn kiuj atrofias la individuan kreskadon. Ni devas helpi infanojn realigi ilian plenan potencialon ene de iliaj propraj loĝlokoj, iliaj propraj lernejoj — kie ili vivas kaj kreskas. Kaj ebligante al ili kontakti kun aliaj kulturoj, ni devas klopodi disvolvi japanan kulturon kiu estos samtempe universala kaj individua.

Kaj tiuj ortodoksaj klopodoj en la edukado fine estos la fortikaĵo de la paco.

# AMIKECO

## Inter Hirosima

## Kaj Dresden



Peter Radig

Ekde la jarfino de 1978 mi okupiĝas pri nia internacia lingvo Esperanto. Mian unuan leteron mi skribis al Bulgario kaj baldaŭ mi trovis geamikojn en Rumanio, Sovetunio kaj Francio. Nuntempe mi korespondas kun ĉirkaŭ 70 geamikoj en 26 landoj de la mondo.

Dankon al sinjoro Kimiaki Kurita, ke mi trovis mian karan japanan amikinson Taeko Maeda, kiu laboras kiel instruistino en lernejo de Hirosima. Interligas nin interesa, elkora leterkorespondado. La sinsekva detruo de niaj urboj Hirosima kaj Dresden en la jaro 1945 per usonaj bomboj estas grava aspekto de nia korespondado. Do ni ne nur interŝanĝas leterojn, sed ankaŭ bildlibrojn de niaj landoj, infanlibrojn kaj tradiciajn aĵojn de Japanio kaj de G.D.R. Precipe mi fieras pri "Yukata" (speco de kimono. Red.), kiun la patrino de Taeko Maeda kudris por mi!

Bedaŭrinde en la lasta jaro mi ne povis renkonti Taeko Maeda en Budapeŝto. Ŝi volis vojaĝi al Pollando kaj Hungario en Orienta Eŭropo kune kun grupo de japanaj pacamikoj. Do mi konatiĝis kun multe da aliaj karaj geamikoj el Japanio en la ĉefurbo de Hungario. Inter ili estis Tsutomu Iwakura (Reprezentanto-Direktoro de la Eldonkomitato Hirosima-Nagasaki), S-ro Masayosi Nagao (Vicprezidanto de Japana Pac-Komitato), S-ino Midori Ai (esperantistino) kaj S-ro Masami Gohda. Nun mi havas pli da karaj japanaj geamikoj. Ni ĉiuj volas fari ĉion por la konservo de la mondpaco.

De 11-a ĝis 25a de januaro 1981 okazis fotoekspozicion "Hirosima-Nagasaki" en la urbdomo de Dresden. Ni vizitis ĉi tiun ekspozicion kun multe da miaj gelernantoj de nia lernejo de profesia edukado.

Antaŭnelonge mi ricevis libron "Hirosima-Nagasaki, Bilda Dokumentoj pri la Atombombado". La libro estas tre interesa kaj donas al la rigardanto multajn valorajn informojn pri la krueleco de la atombomboj. Jes, ankaŭ Dresden estis detruita de angla-usonaj bomboj en la nokto de 13a ĝis 14a de februaro, 1945. Sed la atombombado de Hirosima kaj Nagasaki estis pli kruela ol la bombado de Dresden.

En la libro mi rigardis ĉiujn bildojn ekzakte kaj mi sentis en mia koro profundan keleron kontraŭ la atombomboj kaj kontraŭ la detruoj de la japanaj urboj.

Kiel instruisto mi batalas por paco, kaj mi volas fari ĉion, por ke neniam atombomboj denove minacas la homaron.

*Tiu ĉi artikolo estis verkita de la aŭtoro originale por la gazeto "Sächsisches Tageblatt."*

RIMARKITAJ PRESEŖAROJ  
EN PACO-JAPANA ELDOŖO, 1982

Paĝo/linio	Presita	oni legu
2/-15	tiu	tiuĵ
2/+3	landon	teritorion
3/-27	homoj	nomoj
5/+4	(spaco)	en
6/-8	(mankas tuta linio)	Klarigo pri la bildoĵ sur la fronta paĝo
11/+1	Ĉironup	Ĉironnup
12/+13	instruistoj	entreprenistoj
12/-27	ekceptebla	akceptebla
12/+9	prenis	preni



# ESPERANTO KAJ LA PACO

## -El mia modesta praktikado-

SENGA Ikuo

Kiel universitata studento mi komencis lerni Esperanton, sed mi ne movadis multe per ĝi dum tre longa tempo. Aliflanke mi, kiel membro de Pac-Komitato de la gubernio Gihu, longe laboradis en porpaca movado.

En aŭgusto, 1979, mi havis ŝancon viziti Bulgarijon, Pollandon kaj GDR kiel membro de porpaca delegitaro, kun ekzempleroj de "Bilda Dokumento pri Atombombado, Hirosima-Nagasaki." Dum la vojaĝo S-ro K. Kurita, ĉefredaktoro de la Verda Kolombo, estis mia kunulo. En tiuj landoj ni renkontis tiom multe da veteranaj esperantistoj-pac-batalantoj, ke mi komprenis ke Esperanto estas bona ilo utiligebla por la paco.

Reveninte hejmen mi havis esperantan kurson en mia lernejo. Nun nia kurso havas 32 lernantojn, kvankam la kurso okazas nur unu fojon semajne.

Lastan someron ni sukcesis okazigi ekspozicion pri la bombado en Hirosima kaj Nagasaki. Kiel esperantisto mi raportos tion en Esperanto. Ĝi okazis dum 4 tagoj de la 13a de aŭgusto en iu kultura lernejo en la centra parto de nia urbo Gihu. La lernestro kaj lia sinjorino sincere helpis nin. Kvankam ni ne havis sufiĉe da tempo por preparado, ni sukcesis varbi 1834 vizitantojn kaj kolekti 1288 respondarojn por nia enketado. Inter vizitantoj estis ankaŭ multe da tre junaj gelernantoj kaj patrinoj.

Jen estas kelkaj ekzemploj el iliaj respondoj por nia enketado.

(Tre junaj infanoj)

- Kiel terure!
- Kiel kompatinde!
- Ne plu la milito!

(Geknaboj de elementaj lernejoj)

- Ni ne volas militon!
- Ne plu tiaj teruraj militoj!
- Mi volas vivi en la paco.
- Mi sentis la hororon de la milito.

(Gelernantoj de mezlernejoj)

- Mi deziras, ke oni instruu pri atom- kaj hidrogen-bomboj al gelernantoj de mezlernejo.
- Kontraŭ milito! Kontraŭ nukleaj armiloj!

(Lernanto de altlernejo)

- Mi rememoras la frazon "Ni deziras ke mi estu la lasta viktimo de atombombo."

(Studento de universitato)

- Milito pereigas la homaron. Por la mondpaco ni pereigu la armilojn!

(Junulino)

- Mi estas instruistino de elementa lernejo. Mi volas instrui pri la mizero de atombomba milito kaj valoron de la paco. Ĉar en la lernolibro malmultiĝas la priskriboj pri la atombomboj kaj la atombombado, ni devas instrui la hororon de atombombado kaj kruelecon de la milito.

(30-jaruloj)

- Pro larmoj mi ne povis vidi la bildojn.
- Por niaj infanoj ni nur deziras la pacon.

(40-jarulo)

- Suferinto de la atombombado klarigis por mi pri la fotoj kaj helpis min bone kompreni.

(50-jaruloj)

- Mi, kiu bone konas la militon, estis emociita ĝis larmoj.
- Ni punu la komandantojn, kiuj ordonis faligi la atombombon sur ni.

\*

Multe da homoj rigardis la fotojn kaj priskribis la teruron de la atombombado.

Mi deziras ke similaj ekspozicioj okazu multfoje en nia lando kaj en la tuta mondo.

## FILIPINA BANANO KAJ NI JAPANOJ



NIWA Masahisa

En Japanio preskaŭ ĉiuj bananoj, kiujn ni vidas ĉe fruktovendejoj estas produktaĵoj de Filipino. Banano malmulte kostas lastatempe: 150-200 enoj por unu kg. Nu, kiamaniere oni enportas tiun bananon de Filipino? Unue grandaj plurnaciecaj entreprenoj kontraktas kun malgrandaj bienuloj, kiuj estas devigitaj kultivi bananon kaj vendi la rikolton je malalta kosto, konstante sama dum dek jaroj: 12.5 enoj por unu kg.

La kamparanoj, kiuj perdis siajn kampojn vole nevole laboras en banano-kultivejo por malalta laborpago: ĉirkaŭ 450 enoj por unu tago. El la 29000 laboristoj 9000 loĝas en kabano. Tie el la ĉambro 6x8 metrojn larĝa, dormas ĉirkaŭ 30 personoj.

Por nutri sin ili devas aĉeti ladfiŝaĵon, produktitan en Japanio. Ankaŭ malbonkvalitajn ĉiutagajn necesajojn ili aĉetas per kupono kaj la sumon oni likvidas en pagtago. Plie la kamparanoj ĉiam suferas pro danĝera veneno de agrikulturaj kemiaĵoj. La kemiaĵo "Temik" kun la marko de kranio ne nur malpurigas la teron kaj akvon de Filipino kaj minacas vivon de la kamparaj laboristoj, sed ankaŭ malsanigas nin japanajn konsumantojn.

Kvar grandaj agrofirmaoj entreprenas tiun ĉi produktadon kaj monopolas la eksportadon. En la jaro 1975 la firmaoj profitis dek miliardojn da enoj, dum ili pagis al la laboristoj nur cent milonojn.

ELDONINTO DE TIU ĈI NUMERO:

Japana Pacdefenda Esperantista Asocio  
/ la Japana Sekcio de M.E.M.

SIDEJO: ĉe KURITA Kimiaki, Misima-si  
Yata Sakuragaoka 1209-98, 411 Japanio.

RESPOMDECA REDAKTORO: KURITA Kimiaki.

ELDONA KOMISIITO: TANAKA Takayuki.

LA DATO DE ELDONO: la 20an, aug. 1982.